

tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

aprilo 2006



- ★ Dua eldono de la japana "Hlapić"
- ★ Omaĝo al la viktimoj de holokaŭsto en Zamenhof-strato
- ★ Konsideroj pri Esperanto en Eŭropa Unio
- ★ Mezeŭropa konsultiĝo en Budapeŝto
- ★ Kroataj lernantoj en Euroscola en Strasburgo
- ★ Esperanto-lernantoj renkontiĝos en Kostrena 2006

Karaj legantoj!

Saluton el la printempa Zagrebo!

Nia enkonduka temo, *Konsideroj pri Esperanto en Eŭropa Unio*, verkita de Vjekoslav Morankić, vicprezidanto de KEL, rilatas al Konsultiĝoj de Landaj Asocioj de Mezeŭropo, okazinta en Budapeŝto de la 17-a ĝis la 19-a de marto 2006.

Antaŭ ni estas *Euroscola* - la aprila tago de lernejo en Eŭropa Parlamento en Strasburgo. Dum la kroata grupo prepariĝas por partopreno, ni klopodas profiti de la vojaĝo de la lemanta grupo al Strasburgo informante pri Esperanto en Ministerio pri scienco, klerigo kaj sporto kaj en Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj kaj Eŭropaj Integriĝoj. La vojaĝon de lernantoj al eŭropaj spertoj financas Urba oficejo pri klerigo, kulturo kaj sporto.

En Japanio aperis la dua eldono de la japana traduko de *Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić*. La eldonejo Sxinpu-sxa kaj tradukisto Sekoguchi ken meritas apartan dankon. Grandaj japanaj gazetoj *La Mainichi Shinbun* kaj *Shizuoka Shinhun* publikigis reklamojn pri la *Hlapić-libro* en januaro 2006 en 4 milionoj da ekzempleroj. Prepariĝas la bengala libro pri Hlapić, tradukita de Probal Daŝgupto. Jen sur la foto la bengala revuo *Samatat* en kiu aperis la dua daŭrigo de *Hlapić* en la bengala.

La urbeto Kostrena en majo atendas lernantojn komparontajn siajn sciojn. Du elementaj lernejoj, *Retkovec* el Zagrebo kaj *Sv. Križ Začretje* ricevis financon subtenon por laboro kun talentitaj infanoj. En ambaŭ lernejoj

oni aplikas Esperanton por vastigi la horizonton de la gelernantoj.

KEL post sia Jarkunveno ekde februaro 2006 havas novan prezidantaron kaj novan statuton.

Jam la kvara jaro komenciĝas ekde kiam ni zorgas pri nia estonta ejo en Vodnikova 9! La repagado de la kredito bone progresas.

Nia gazeto *Tempo* ankaŭ por 2006 ricevis financon subtenon de Ministerio pri kulturo.

En julio (22-24) Kroata Esperanto-Ligo gastigos Renkontiĝon de Esperantlingvaj Verkistoj.

Karavano de kroataj esperantistoj al Universala Kongreso de Esperanto en Florenco bone progresas. Pluraj infanoj partoprenos Infanan Kongreseton en Prato. Kelkaj membroj partoprenos en SAT-kongreson en Beogrado. Junaj membroj veturos al IJK en Sarajevo kaj akceptas gastojn ĉe sia Mezsomera aranĝo en Lovran. Nova membro Tihomir Lovrić gajnis



"Hlapić" en la bengala

stipendion por NASK -Nordamerika Kursaro.

Riĉa somero estas antaŭ ni.

Ni ekspedas al vi tiun numeron el Rijeka per helpo de Boris Di Costanzo.

S. Ŝtimec



Januara programo: Omaĝo al viktimoj de holokaŭsto en Zamenhof-strato en Zagreb, realigita per helpo de Urba oficejo pri klerigo, kulturo kaj sporto

Tempo

Fondita en 1980. Ne aperis en militaj jaroj 1993 kaj 1994. Aperas laŭeble kvarfoje jare - Jaro XXV, numero 1/2006, ISSN 0352-1583. Tiu ĉi numero estas eldonita per financa helpo de Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio.

Redakcio: Kneza Mislava 11/III, HR-10000 Zagreb, Kroatio, tel: (385 1) 4617550, fakso (385 1) 4619373, rete: esperanto@zg.t-com.hr, www.esperanto.hr - **Kontribuis:** Mina Dan, Norman Darlington, Boris Di Costanzo, Zlatko Hinšt, Emil Hrvatin, Jes, sed, Tomislav Maretić, Lajos Molnar, Vjekoslav Morankić, Revuo Samatat, Sekoguchi Ken, Sezonoj, Faruk Islamović, Nikola Rašić, Judita Rey Hudeček, Tihomir Lovrić, Spomenka Ŝtimec, Urban Republic, Tina Tišljar, Zlatko Tišljar. - **Redaktoris** Spomenka Ŝtimec - **Grafike aranĝis:** Josip Pleadin. **Presis:** Grafokom, Durdevac, grafokom@kc.htnet.hr - **Anonctarifo** 1/1 paĝo 1000 kn (135 EUR) 1/2 paĝo 500 kn (68 EUR), lasta kovrilpaĝo 2.500 kn (328 EUR). **Abono:** 4 numeroj jare 40 kn (9,5 EUR), unuopa numero 10 kn (1,5 EUR)

La redakcio ne respondacas pri la opinioj en la subskribitaj tekstoj.

ESPERANTO EN EUROPA UNIO

AGADVOJOJ POR ESPERANTO EN EŬROPA UNIO

Esperanto povus havi jenan statusan pozicion en Eŭropa Unio:

A) Interna afero de ĉiu unuopa membroŝtato aparte.

B) Afero kiu koncemas Eŭropan Union kiel juran unuiĝon de ŝtatoj aŭ civitanoj.

A) Esperanto kiel interna afero de ĉiu unuopa ŝtato

Esperanto estas unue traktata kiel lingvo, kaj ĝi ĝenerale estas konsiderata kiel fremda lingvo (kiel ekzemple angla, franca, germana rusa kaj tiel plu). Malgraŭ tio ke lingvo estas lingvo ŝtatoj volas diferencigi lingvojn kiel aŭtoktonaj lingvoj kaj neaŭtoktonaj lingvoj. Krome lingvoj ofte laŭleĝe estas difinitaj kiel lingvoj de naciaj minoritatoj. En Italio ekzistas kromnocio "lingvo de nacia minoritato" kaj ankaŭ nocio "lingva minoritato". En Italio laŭ konstitucio kaj leĝoj estas protektataj ambaŭ: ĉu lingvoj de naciaj minoritatoj ĉu lingvoj kiujn oni traktas kiel lingvajn minoritatojn. Lingvaj minoritatoj en Italio estas greka, kastilia aŭ okcitana (ssassarese), tin lasta parolata en urbo Ssassari en Sardinio. Kiel lingvan minoritaton oni povas ankaŭ trakti eĉ dialektojn de nacia lingvo (en Italio ekzemple sarda, sicilia, friula, dolomita kaj simile). Ne estas klara diferenco inter lingvo kaj dialekto. Sed la ĉefa afero estas ke laŭ diversaj ŝtataj leĝaj reguloj, la ŝtato plejparte el la lingvoj de naciaj minoritatoj aŭ lingvaj minoritatoj, protektas nur tielnomatajn aŭtoktonajn lingvojn. Diferencigo de lingvoj en naciaj, naciminoritataj, aŭ lingvaj minoritatoj servas al ŝtatoj por diversmaniere laŭleĝe trakti la lingvajn rajton en publika uzo, en edukado kaj en aliaj kazoj.

Precipe por ŝtatoj estas gravega diferencigo de aŭtoktonaj kaj neaŭtoktonaj lingvoj. Tiu diferencigo servas al ŝtatoj por protekti iujn lingvojn sed ne aliajn. (Ekzemple, en Francio oni rajtas en instruado protekti la okcitanan sed ne la araban). Alia afero estas se temas pri fremdaj lingvoj. Ili ĝenerale havas nenian internan protekton de ŝtato sed samtempe ŝtatoj per eduka sistemo enorme aŭ ege protektas iujn fremdajn lingvojn en edukado aŭ en uzado ĉe ŝtataj servoj kaj oficistoj aŭ por ŝtataj bezonoj. Ekzemple, la anglan, germanan, francan ktp.

Kio estas, kaj kia estas pozicio de Esperanto en tiu diversmaniera aliro al lingvo-demandoj? Se temas pri nocioj, Esperanto havas jenajn aspektojn de tiuj diversaj pozicioj aŭ difinoj. Ĝi estas:

1. fremda lingvo neaŭtoktona
2. aŭtoktona lingvo
3. aŭtoktona lingva minoritato (parolantoj de Esperanto).

1. Al plimulto da loĝantoj (neesperantistoj) la nocio sub punkto 1. estas klara. Do, se oni postulas aŭ praktikas instruadon de Esperanto en lernejoj, precipe publikaj lernejoj, Esperanto estas traktata kiel fremda lingvo (same kiel angla aŭ franca).

2. kaj 3. Se en iu lando Esperanto estas aŭ estus agnoskita kiel aŭtoktona lingvo, signifus ke ĝi havas rajton esti instruata kiel lingvo de nacia aŭ lingva minoritato. Tio signifus ke esperantistoj havus rajton havi infanĝardenojn, lernejojn kaj edukajn instituciojn en unu lando.

B) Esperanto en Eŭropa Unio au en Eŭropa Konsilio

Agnoski aŭtoktonecon de nia lingvo signifas, ke en Eŭropa Unio Esperanto havu la samajn rajton kiel la eŭska,

kataluna, cigana kaj aliaj neŝtataj lingvoj. Pro diversaj kaŭzoj povus okazi ke Eŭropa Unio decidus pri (aŭ kreas leĝojn pri) la rajtoj kaj instruado de neŝtataj lingvoj. Esperanto devus esti inter ili.

Lau mia opinio, se Esperanto estus konsiderata kiel aŭtoktona lingvo de Eŭropo IU AJN ŜTATO DE EŬROPA UNIO HAVUS RAJTON PROPONI ESPERANTON KIEL UNU EL OFICIALAJ LINGVOJ DE EŬROPA UNIO AŬ EŬROPA KONSILIO (precipe se tio hazarde okazos al kataluna, eŭska aŭ al iu alia neŝtata lingvo). (Tio ne signifas ke Esperanto ne estas ankaŭ aŭtoktona ĉie kie ĝi estas parolata kiel en Brazilo, Ĉinio, Rusio aŭ Japanio)

Lingva demando en Eŭropo nek estas teknika demando, nek demando pri tradukkkostoj. Valoras politike batali por Esperanto pro tio ĉar oni taksas ke Esperanto estas lingvo kiu povas servi al evoluo de eŭropa identeco de civitanoj de Eŭropo kaj protekto de ĉies lingvo kaj kulturo en Eŭropo. Iuj politikaj partioj en Eŭropojam akceptis tiun koncepton. Tial la radikalaj akceptis Esperanton kaj postulas enkondukon de Esperanto kiel federa lingvo en Eŭropo, kaj tio fakte estas politika demando. Kiun kaj kian Eŭropon ni bezonas estas demando de popolo. Ne povas 200 milionoj da mezriĉaj aŭ neriĉaj eŭropanoj sendi siajn infanojn al Londono aŭ al Usono por ellerni la anglan por ke ili povu paroli ĝin preskaŭ "denaske". Ni bezonas Esperanton por popoloj de Eŭropo kaj ne nur por elito kaj burokratoj de partitokratio. Ni eŭropanoj ne volas fariĝi usonanoj. Ĉiu en Usono devas per tiel nomata amerika miksopoto fariĝi denaske angle parolanta usonano. Ni eŭropanoj ne devas perdi siajn identecon, kulturojn kaj lingvojn. Sed ni volas ankaŭ trakti Eŭropon kiel nian komunan patrujon kaj tiamaniere krei eŭropan identecon. Nenia nacia lingvo povas utili por kreo de eŭropa identeco precipe ne hegemonia lingvo kiel angla, sed same estas pri franca aŭ germana. Esperanto estas ĝuste pro tio bezonata por eŭropanoj por krei eŭropan identecon pere de Esperanto kaj protekti kaj kulturi siajn proprajn naciajn, regionajn kaj aliajn identecojn. Radikalaj kaj ankaŭ iuj aliaj partioj prenas Esperanton kiel rimedon por krei egalrajtecon en internacia vivo de Eŭropo kaj pere de ĝi krei eŭropan identecon. En lastaj balotoj por Eŭropa parlamento, krom radikalaj partoprenis ankaŭ Esperantaj partioj, precipe en Francio kaj Germanio. En Eŭropan parlamenton estis tamen elektitaj ankaŭ du gedeputitoj kiuj estas ankaŭ esperantistoj, ambaŭ en Pollando.

PROPONO DE AGADPROGRAMO
POR SUBTENI KREADON
DE EŬROPA IDENTECO

Se politikaj kaj kulturaj fortoj de iu ŝtato volus subteni tiun ĉi vojon, oni devus enkonduki uzon kaj instruadon de Esperanto ĉie kie tio eblas samkiel eble subteni la agadon pri identeco. Precipe pri tio devus decidi la organoj de ŝtato (Parlamento kaj Registaro), sed ankaŭ aliaj politikaj, kulturaj sociaj kaj aliaj instancoj kaj organizoj. Nenia identeco povas esti altrudita sed devas esti libere akceptita. Tio validas por ĉiu eŭropa identeco ĉu tiu bazita je Esperanto, ĉu je la angla, ĉu je la germana, ĉu je la franca aŭ je la rusa aŭ je iu ajn alia lingvo. Neniu povas esti altrudita, ĉiu devas esti libere akceptita. En tiu senco Esperanto devus havi nur egalrajtecon, kaj ĉiuj rajtus kaj povus elekti sian vojon en la estontecon.

Por komenci krei eŭropan identecon ni proponas la unuajn paŝojn jene:

AGADPROGRAMO

1. Informado pri la neŭtrala eŭropa identeco kaj pri Esperanto kiel ilo por krei eŭropan identecon. La informado celu popolojn kaj sociajn instituciojn (kiel politikajn partiojn, kulturajn kaj aliajn sociajn asociojn por krei eŭropan identecon.

2. Enkonduko de Esperanto kiel egalrajta lingvo en internaciaj kontaktoj de unuopaj ŝtatoj. Enkonduki uzon de Esperanto en respektivaj ŝtataj institucioj.

3. La mezeŭropaj ŝtatoj devus proponi enkondukon de Esperanto kiel egalrajta lingvo kun aliaj lingvoj uzataj en internaciaj dokumentoj kiel pasporto, persona legitimilo kaj aliaj dokumentoj.

Rimarko: Enkonduko de Esperanto havus ankaŭ simblan signifon: tio estus pruvo ke ekzistas la ĝenerala egalrajteco. Tio same signifus la vojon al nia nova Eŭropo, Eŭropo de la neŭtrala eŭropa identeco.

4. Esperanton oni devus enkonduki kiel egalrajtan lingvon (libere elekteblan) en ĉiuj niveloj de publika edukado kiel en:

- elementaj lernejoj
- mezlernejoj
- altlernejoj kaj universitatoj

5. La mezeŭropaj ŝtatoj devus proponi egalan uzon de ĉiuj lingvoj de Eŭropa Unio en komunaj projektoj de la Eŭropa

Unio, inkluzive de Esperanto kiel internacia sed neŝtata lingvo.

Landaj E-asocioj devus socie kaj politike agadi por ŝanĝi la ĝisnunan praktikon laŭ kiu en komunaj projektoj de Eŭropa Unio kaj Eŭropa Konsilio estu uzata ĉefe nur la angla (ekz. en projektoj en Kosovo, Bosnio kaj Hercegovino, en Irako, dum observado de balotado k.s). Oni proponu la sinsekvan uzon de ĉiuj lingvoj de Eŭropa Unio, ekz. unu projekto uzu la anglan, dua projekto la francan, tria projekto la italan kaj tiel plu. Tio estu proponita por certigi la egalrajtecon de ĉiuj civitanoj de Eŭropa Unio. Oni ne povas en la projektoj engaĝi nur tiujn civitanojn kiuj konas la anglan dum ĉiuj aliaj estu diskriminataj (parolantoj de la germana, itala, hispana, franca ktp).

Rimarko: ne temas nur pri la egalrajteco sed ankaŭ pri rajto ricevi laboron el financaj rimedoj kiuj estas komunaj por ĉiuj civitanoj de Eŭropa Unio.

6. La mezeŭropaj landaj Esperanto-Asocioj devus insisti ĉe registaroj de siaj ŝtatoj ke oni akceptu decidon por proponi Esperanton kiel unu el oficialaj lingvoj de Eŭropa Unio kaj de Eŭropa Konsilio.

7. Laŭ la proponita agadprogramo ĉiu el la mezeŭropaj landaj Esperanto- asocioj devus laŭ sia povo persiste agi ĉe siaj internaj ŝtataj institucioj por akcepto de tiu ĉi programo (aŭ almenaŭ parto de ĝi).

(Iom koncizigita materialo verkita por Konsultiĝo de Landaj Asocio de Mezeŭropo en Budapeŝto, marto 2006).

Vjekoslav Morankić

TRAKTATO PRI EŬROPA KONSTITUCIO

Hungaraj esperantistoj publikigis *Traktaton pri Estigo de Eŭropa Konstitucio (I-II partoj)*. La broŝuron redaktis dulingve, angle kaj Esperante D-ro Ludoviko Molnar. Rete ĝi estas konsultebla en 21 eŭropaj lingvoj ĉe www.egalite.fw.hu.



KONSULTIGO DE LANDAJ ASOCIO DE MEZEŬROPAJ LANDOJ

La ĉi-jaran Konsultiĝon de mezeŭropaj landoj gastigis Hungario en Budapeŝto de la 17-a ĝis la 19-a de marto 2006. Krom la gastigantoj partoprenis reprezentantoj el Aŭstrio, Ĉeĥio, Slovakio, Pollando kaj observanto el Bulgario. Mankis Slovenio. Kroatio estis reprezentita per Spomenka Ŝtimec kaj Boris Di Costanzo kiuj respektive prezentis temon *Per kio kroata Esperanta Movado apartas kaj pri Instruado de Esperanto en Kroatio kaj laboroj de la Kroata ILEI*. La teksto pri Konsideroj pri Esperanto ĉe Eŭropa Unio de Vjekoslav Morankić estis distribuita kaj ni publikigas ĝin en ĉi-numero de *Tempo*.

Ni instruas en 2006

1. Kroata Fervoja Esperanto-Asocio
Instruas: **Roža Brletić-Višnjić**
2. Privata ekonomia kaj informatika gimuzio
Teslina Str. Zagrebo
Instruas: **Tina Tišljar**

PER KIO



APARTAS?

Pluraj el niaj landaj asocioj festas en la venontaj jaroj sian centjariĝon. Pluraj el ni havas eldonan, informan kaj instruon agadon.

Nombro Kroata Esperanto-Ligo ne apartenas al la plej elstaraj asocioj: en 2005 ni havis 356 membrojn.

Profesia laboro

Kroata Esperanto-Ligo diferencas de kelkaj najbaraj asocioj per tio, ke ĝi havas apogon de Ministerio pri kulturo ĉar ĝi pruvas sin de jaro al jaro kiel esence kultura asocio - partnero de la Ministerio. Tial Ministerio subtenas Kroatan Esperanto-Ligon finance. La financa subteno en proksimuma valoro de 10 000 eŭroj jare ebligas la vivtenon de la posteno de unu persono kiu ĉefe kulture agas pri Esperanto, sed krome okupiĝas pri *sekretariaj laboroj* de KEL.

Ekzemplo de eksterlanda kultura agado en 2005

Kroata infanlibro *Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić* estis per laboro de KEL tradukita en la persan en 10.000 ekzempleroj; en la japanan en 4000 ekzempleroj; en la bengalan en 500 ekzempleroj.

Enlande en 2005 Ministerio pri kulturo financis libroekspozicion kadre de la 7-a kongreso de kroataj esperantistoj.

Diversaj kulturaj instancoj financas unuopajn programojn en KEL.

Ekzemploj por 2006:

Jen kiujn programojn kulturaj instancoj opiniis finance subtenindaj:

1. La gazeton *Tempo* (4 numerojn jare, 1.200 eŭrojn)
2. Renkontiĝon de esperantlingvaj verkistoj (ekde 2003, per 2.000 eŭroj)
3. Tago de memoroj pri la viktimoj de holokaŭsto (en Zamenhof-Strato, 700 eŭrojn)

Nemoveblaĵoj

Gvidantoj de Kroata Esperanto-Ligo opinias ke dum la unuaj jarcento ni evoluis la lingvon.

En la dua ni fortigu la Esperantan Movadon ekonomie. Tial KEL koncentrigis siajn fortojn en la lastaj jaroj por krei siajn posedaĵojn:

- Esperanto-Domo en Kostrena apud Rijeka
- Propra ejo de 85 m² en urbocentro de Zagrebo (aĉetita en 2003)

Pri la dua ni daŭre repagadas krediton por ĝia aĉeto - ĝis 2012.

Niaj membroj investis en ĝin proprajn 11.000 eŭrojn.

S. Štimec

KROATA ESPERANTO-LIGO HAVAS NOVAN PREZIDANTARON



Sur la foto la nova prezidantaro: De maldekstre Ljerka Stilinović (membro; agadkampo financoj), Spomenka Štimec (sekretario), Vjekoslav Morankić (vicprezidanto), Zlatko Hinšt (membro - agadkampo Faka agado), Marija Jerković (membro - agadkampo ILEI), Vida Jerman (membro), Vjekoslav Morankić (vicprezidanto), Judita Rey Hudeček (membro - agadkampoj: instruado, handikapitoj), Boris Di Costanzo (membro). Ĉe la konstituiga kunsido mankis prezidanto Dalibor Brozović, vicprezidantoj Radenko Milošević kaj Davor Klobučar kaj Dag Treer, respondeculo por junulara agado.

Kroata Esperanto-Ligo havis sian jarkunvenon la 19-an de februaro 2006 en Knez Mislav 11. Ĉeestis preskaŭ ĉiuj membroj de la Asembleo, krom la malsanaj prezidanto Daribor Brozović kaj vicprezidanto Radenko Milošević. Estis aprobata la nova Statuto de la asocio, samkiel la financa kaj jara raporto por 2005 kaj Laborplano 2006.

S. Štimec

NOVA ESTRARO DE ESPERANTO-SOCIETO "BUDE BORJAN"

Esperanto-Societo "Bude Borjan" jarkunvenis la 22-an de februaro 2006 kaj elektis novan prezidantaron. La membroj adiaŭis de kasisto Branka Čečuk -Cesarec kiu prizorgis kasajn kaj librotenajn laborojn dum pli ol du jardekoj.

Sur la foto la novaj membroj de la Prezidantaro:

En la unua vico: Spomenka Štimec (vicprezidanto), Bojana Duričić (membro), David Rey Hudeček (kasisto). En la dua vico: Tihomir Lovrić (sekretario), Nedeljko Korasić (membro), Anto Mlinar (prezidanto) kaj Branka Čečuk-Cesarec. Sur la foto ne ĉeestas membro Boris Čović, taskigita helpanto de nova kasisto David Rev Hudeček.

En „Bude Borjan“ la nova prezidantaro ekgvidis la 61-an laborjaron de la societo.

S. Štimec



ESPERANTO EN RIJEKA 100-JARA EN 2007!

La departamento Primorsko-goranska fariĝis la aŭspicianto de la centa jubileo en Rijeka venontjare. Ni planu partoprenon por celebri la jubileon, la 24-an de novembro 2007.

Ĉu vi devas ion pagi al UEA?

Dum Kroatio ne havas ĉefdelegiton, monon por Universala Esperanto-Asocio akceptas provizora anstataŭanto Spomenka Štimec. Bv. adresi viajn pagojn poŝte al Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava 11, 10000 Zagreb.

7-a KONGRESO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO

Maribor organizas la 7-an kongreson de Eŭropa Esperanto-Unio okazontan de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2007. La ĉefa temo de la kongreso estas *Akvo destinata eŭropan estontan de la 21-a jarcento*. Kromc oni traktos temon *Kion lernu Eŭropa Unio el jugoslavia lingva sperto*. Ne estas malproksime veturi ĝis la najbara Slovenio.

www.esperanto-maribor.si

EKZAMENOJ EN RIJEKA

Dum pli ol tri monatoj dufoje semajne gekursanoj diligente lernadis kaj fine sukcesis ekzameniĝi.

Post la ekzameno ili daŭrigas lernadon en la societejo de Rijeka unufoje semajne. Ĉiuj fariĝis membroj de la Societo. Prezidantaro de Esperanto-Societo Rijeka kore gratulas.

Sur la foto de dekstre: Tea Radovanoviĉ, Bernarda Lenac, instruistino Josipa Katunar, Marin Badurina kaj Klementina Perašiniĉ. (BdC)



KONGRESO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (SAT)



okazos en Beograd (Serbio kaj Montenegro) de la 19-a ĝis 26-a de aŭgusto 2006.

Pri la kongreso informas kaj peras:
Vjekoslav Morankić, Lipa 40 E, 51000 Rijeka
Telefono/faksilo: 051/228 148
Rete: esperanto.rijeka@ri.htnet.hr

GELERNANTOJ EN KOSTRENA 2006

Konkurso pri scio de Esperanto por gelernantoj el elementaj lernejoj okazos de la 19-a ĝis la 21-a de majo 2006 en Kostrena. Kiu plej bone scios Esperanton? Kiu konkeros Pokalon Kostrena? La gastiganto de la konkurso estas skolta restadejo Esperanto-Domo. Ĉi-foje en aparta kategorio konkuri povas mezlernejanoj.

Samtempe kaj samloke okazos ankaŭ Internacia Junulara Renkontiĝo kun la temo Naciaj kulturoj kaj Eŭropa identeco.

Interesiĝantoj bonvolu informiĝi ĉe esperanto.rijeka@ri.htnet.hr aŭ emil.hrvatin@ri.htnet.hr

Emil Hrvatin



KROATAJ LERNANTOJ EN EUROSCOLA EN STRASBURGO

Kvar kroataj lernantoj preparas sian partoprenon en *Eŭroscola*, lerneja programo okazanta en Eŭropa Parlamento kadre de *Semajno de Eŭropa Amikeco* de la 23-a de ĝis la 27-a de aprilo 2006. Invitinto de la kroataj lernantoj estas finna lernejo kaj la instruistino Carola Antskog. La projekton de la partopreno organizas *Elementa lernejo Retkovec* kadre do siaj aktivecoj por talentaj lernantoj. La grupon de gelernantoj gvidas instruistino el Elementa Lernejo Mladost en Zagrebo *Marija Jerković*.

Partoprenos gimnazianoj David Rey Hudeček kaj Tina Tišljar kaj 15-jaruloj kiuj gimnaziigos aŭtune Drago Ilišinović kaj Mladen Puh. Por ke la grupo povu bone prepari sin por la vojaĝo akceptis ĝin Ministerio pri scienco, klerigo kaj sporto kaj Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj kaj F.ŭropa Integriĝo. Tie la gelernantoj la 23-an de marto 2000 ĉeestis prelegon por klerigi pri Kŭropo.

S. Ŝ.

LERNANTINO EL ZAGORJE POZAS



Lernantino de elementa lernejo Sveti Križ Začretje Maria Badanec, kiu vizitas Ksperantan kurson, pozis kiel modelino por Urban Republic. (Sur la foto).

Vi konatiĝos kun ŝi dum Konkurso pri scio de Esperanto en Kostrena.


SAMIDEANOJ - NOVA LIBRO DE ZAGREBAJ AUTOROJ



Samideanoj estas la titolo de nova libro kiu aperis en Kaliningrado ĉe *Sezonoj* en 2000. Temas pri satiroj kaj humuraĵoj pri Ksperanto kaj esperantistoj. Kn la libro redaktoro Aleksander Korjenkov kolektis satirajn verkojn de 21 aŭtoroj kiuj originale verkis en Esperanto.

Kstas interese ke en la libro aperis ankaŭ kontribuoj de zagrebaj aŭtoroj: du tekstoj de Roger Imbert kiu sub la pseŭdonimo HiStRiKo verkis satirajn kontribuojn por la bulteno de Studenta Esperanto-Klubo *Jes. sed*. La bulteno de studentoj aperadis en 1972-1975 kiam Studenta Esperanto-Klubo aparte viglis. Ka tekstoj kiujn la libro revivigas el la epoko de *Jes. sed* estas *La noktoj de Sam Ideano* kaj *Sam Ideano kongresas*.

En la *Samideanoj* estas legebla ankaŭ satiro *Gastamo* de Spomenka Ŝtimec.





Eŭropaj gvidlinioj kaj leĝoj pri liberaligo de fervoja trafiko

Preleginto akcentis rolon kaj signifon de gvidlinioj pri fervoja trafiko kiuj estis aprobitaj en Eŭropa Unio. (Vidu *Kongresan Libron* de la 7-a kongreso de kroataj esperantistoj, 2005, sur paĝoj 17-20). La unua gvidlinio aprobita en la jaro 1991 estis deviga apartigo de fervoja transporto kaj infrastrukturo, libera eniro por kombinita trafiko inter landoj. Ekde la jaro 1995 ĝis 2004 aperadis novaj gvidlinioj kaj pluaj preskriboj kiuj pli detale reguligas koncernajn aferojn.

Nun la gvidlinioj permesas liberan uzon de fervoja reto por la tuta vatrafiko. En kladro de la pasaĝera trafiko estas ebligata tiel nomata kabotaĵo (eksterlanda transportisto trafikis en alia lando). Sur la merkato de fervojaj servoj aperis multe da fervojaj entreprenoj kaj aliaj transportistoj (operatoroj). La plej grava tasko estas apartigado en formo de tiel nomata vertikala apartigo de fervoja infrastrukturo disde fervoja transporto. La menciitaj gvidlinioj siamaniere estas parto de Leĝo pri fervojo, aprobita de Kroata Parlamento en la mezo de jaro 2003. Ĝia aplikado komenciĝos ekde la 1-a de januaro 2006 (nova organizado). Post kelkaj jaroj oni supozas malfermon de la kroata fervoja reto por ĉiuj operatoroj (fervojaj kaj similaj transportistoj). Oni devos esti preparita por la komuna estonteco.

Estas tre interesaj eblecoj kaj konsekvencoj kiuj povus aŭ ekestos kiel rezultoj de tiaj ŝanĝoj. Ekzemple, unu el la eblecoj en novaj cirkonstancoj estas eniro de tuta trajno el unu al alia(j) lando(j), t.e. ne ŝanĝante inter ŝtatlimoj lokomotivojn kiel estas nuna praktiko kaj devigo. Lasttempe oni supozas specialan instruitecon de lokomotivestroj kun la celo ekkoni eŭropajn relvojojn. Kiel lokomotivestro, kiam li transiros de unu lando al la alia, povus sukcese interkomunikiĝi kun stacidoma kaj alia oficiala fervoja personaro? La lingva problemo restas solvenda. Interalie, la problemo ampleksas ankaŭ tradukon de dokumentoj. En kazo de translokiĝo de fervoja personaro el unu lando al alia, estiĝos pli granda problemo. La teknika kaj ĝenerala fakpersonaro, inkluzive estrojn kaj afergvidantaron, el la lando de investantoj aŭ proprietuloj, en la kazo de posteniĝo en alia lando verŝajne havos la eblecon ellerni lingvon de la koncerna lando aŭ apliki scion de unu el mondaj lingvoj (ekzemple la angla), aŭ insisti pri sia (gepatra) lingvo. En la plej bona kazo eblus uzi Esperanton.

En ĉi-tiuj situacioj estas tre ofte ĉeestanta problemo, apliko de diversaj regularoj kiuj estas skribitaj en la origina lando kaj transiranta en la alian landon. Eĉ kaze de harmoniigitaj regularoj en la kadro de EU kaj EK, restas la problemo ĝis la adekvata solvo de la lingva problemo. Finfine, la movebleco de laborforto estiĝas unu el fundamentaj rajtoj kaj liberecoj en Eŭropo. Eblas supozi eniron de eksterlandaj transportaj entreprenoj, kiuj dungos

pli malmultekostan laborforton. Se ekzistas granda kvanto da senlaboreco enlande, kombinita per la nefavora elekto de lingvo, tio povas esti samtempe ekonomia, politika kaj socia problemo. En cirkonstancoj de granda diferenco de salajroj, konkurenco inter laborforto estas tre akra kaj povas kaŭzi seriozajn problemojn por enlandaj laboristaro kaj fakuloj. Interalie Esperanto povas helpi al dungitoj por ebligi pli egalrajtan konkurencon en novaj kondiĉoj. Por dungantoj, sindikatoj kaj ŝtato tio donas pli bonajn kondiĉojn por agado.

Lingva problemo kun speciala konsidero de Kroatio

Kiel teknike fari bonajn kondiĉojn por egalrajta uzado de multaj lingvoj en EU? Tradukado estas unu el grandaj problemoj. Daŭriginte temon, preleginto akcentis unu malbonan sperton - ekzemplon el kroata historio kiu montras, interalie, al eblaj problemoj.

Ekde la jaro 1848 laŭ decido de Kroata Parlamento oni enkondukis la kroatan lingvon kiel la oficialan. Sed procedoj de germanigo kaj hungarigo en Kroatio, okazintas kadre de Aŭstro-Hungaria Monarkio en la dua duono de la 19-a jarcento, subpremadis la kroatan lingvon en la publika uzo. Unuatempe pli fortan influon realigis la germana, sed ekde la sesdekaj jaroj la hungara lingvo. Tio estis absurda situacio dum eĉ en la plej grava interŝtata dokumento, Kroata-Hungara Interkonsento, estis rekonita la kroata lingvo. Sed la hungara lingvo estis praktike nur la sola uzata lingvo en la tiamaj kroataj fervojoj. Tio influis la posteniĝon de kroatoj en fervojo. Pri mastrumado de entrepreno fare de kroatoj kaj ebleco posteniĝi en "pli superaj laboroj" (inspektoroj, direktoroj), ne estas necese speciale paroli (pri tio oni povas vidi pli detale en la libro de Juraj Padjen: *Trafika politiko de Kroatio*, Masmedia, Zagreb, 2003, paĝoj 148-152). Tio estas bona ekzemplo kiel en certaj historiaj cirkonstancoj unu malgranda lingvo superis la alian malgrandan lingvon. Tia situacio restis ĝis la disfalo de Aŭstro-Hungaria Monarkio en la jaro 1918. Tio estas ne nur lingvoproblemo, sed eĉ la problemo pri nacia ekzistado, kiel akcentas profesoro Padjen. Logike estas starigi demandon; kio estas ebla en la nuna tempo? Verŝajne ne eblas tiaspeca lingva diskriminacio, sed pli subtila speco de diskriminacio estas/estos ebla. Probable influo al laborforto, precipe laŭ estroj, povos esti obstaklo por la hejmlanda loĝantaro.

Dum periodo de Jugoslavijaj fervojoj, dum multaj jaroj, la plej ofte uzata lingvo estis la serba, aŭ tiam oficiale nomita serbokroata lingvo. Sed en la sepdekaj kaj okdekaj jaroj de la pasinta jarcento oni enkondukis la kroatan sub la nomo de la kroatoserba lingvo. Multaj regularoj kaj aliaj oficialaj dokumentoj estis en serba lingvo. Eĉ la komuna fakverko de du jugoslavijaj esperantistoj - fervojistoj Ludoviko Sekereš kaj Josip Županić sub la titolo *Fervoja terminareto* estas ankaŭ en serba (kroata) lingvo. En la serba lingvo kaj paralele en Esperanto aperis tuta *Fervoja terminaro de Internacia Fervoja Unio* (UIC). Esperanta versio de terminaro aperis antaŭ oficiala eldono de CD-ROM en kadro de UIC. Ĝis nun aperis eldonoj de CD-ROM en 20 lingvoj. Tradicie en kadro de UIC kiel oficialajn lingvojn oni uzas la anglan, germanan kaj francan. Estas necese uzi grandajn kaj utilajn spertojn de Faka komisiono, precipe Terminara sekcio de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF) kaj aliaj fakaj terminologioj, el eksterlando kaj el nia lando. Probable en Kroatio oni uzos la terminaron en la serba lingvo ĝis la fino de adekvata traduko kaj adaptiĝo al la kroata lingvo. Nun Kroataj Fervojaj devas labori pri la kroata eldono de *Fervoja terminaro*. Antaŭkondiĉo de la sukcesa laboro estas oficiale akceptita kaj aprobita terminologio de fervojaj fakterminoj en la kroata lingvo. Estas normala afero, ke en la memstara ŝtato kaj fervoja administracio oni devas havi tian terminaron, kaj senĉese zorgi pri ĝia plibonigo, aktualigado kaj apliko. La Esperanto-movado devas helpi al fervojo en tiuj klopodoj.

Fina komento

Tendencoj kadre de liberaligo de eŭropa fervoja trafiko estas fenomeno kiu ne estas sendependa de lingva problemo. Respubliko Kroatio kaj Kroataj Fervojoj povas proponi lingvan problemon kiel unu el punktoj en traktado kun EU. Unuatempe estas necese enkonduki Esperanton kiel laborlingvo en Eŭropa Unio, samtempe kun rekomendo por realigi ĝin per siaspeca maniero en ĉiuj landoj. Poste ekzistas ebleco por ĝia enkondukado kiel oficiala lingvo. Estas grave atingi multajn plibonigojn, akordigojn kaj evoluon de Esperanto en diversaj aktivecoj kaj kampoj de la ĉiutaga vivo, ekonomio, politiko ktp., kio estas la reala bazo de ĝia sukcesa aplikado.

RESUMO

En la artikolo la aŭtoro akcentas ĉiujn gravajn aspektojn pri negocado kaj evoluo de eŭropaj fervojoj kiuj ekestas per apliko de eŭropaj gvidlinioj de Eŭropa Komunumo kaj leĝoj el Eŭropa Unio, surbaze de kiuj oni akordigas leĝarojn de aliaj landoj. Cele al pligrandigo de efikeco de fervojaj entreprenoj, okazas ŝanĝoj pri organizado, kiuj eĉ gvidas al malpliigo de nombro da enpostenigitoj. Ekzemple, oni disdividas fervojajn entreprenojn en plurajn kompaniojn, ekestas privatigo kaj estas ebligata engaĝiĝo de eksterlandaj proprietuloj. Oni ebligas liberan aliron al fervoja infrastrukturo al ĉiuj interesitaj fervojaj kaj similaj transportentreprenoj, kaj finfine oni enkondukas konkurecon ne nur inter trafikaj branĉoj, sed eĉ kadre de fervojaj entreprenoj mem. Sed restas nesolvita la lingva problemo, en vera senco de lingva komunikado. Granda problemo estas manko de iu ajn dekretopunktoj (klaŭzoj) pri la lingva uzo kaj pro tio estas malfacila pozicio de dungitoj, kiuj en estonteco povas esti en pozicio ke ili ne povas elekti lingvon, sed dunganto tion povas fari. Esperanto estas la plej bona solvo en Eŭropa Unio kiu eĉ nun uzas dudek unu lingvojn, sed ne estas certe kiomgrade tiuj lingvoj restos egalrajtaj. La Internacia Lingvo prezentas raciigon de la lingva uzo per kiu oni pli facile efektivigas eĉ egalrajtecon de la propra lingvo kaj speciale egalrajtecon de lingvoj de malgrandaj popoloj. Tio estas precipe grave por Respubliko Kroatio, kaj speciale oni atendas tiusence sindonan laboron pri solvado de la lingva problemo en Eŭropo. Kroataj fervojoj, komune kun aliaj instancoj, kiel enlande, tiel je internacia nivelo, devas kontribui al pli kvalita solvado de lingva problemo, kio estas esenca por ĝia evoluo kaj pozicio en estonta Eŭropa Unio.

D-ro Zlatko Hinš

| | |
|-------------------------------|--------------|
| 130. AntoMlinar | 2,00 |
| 131. SavaMatetiĉ-Lučić | 10,00 |
| 132. Radenko Milošević | 172,00 |
| 133. Karmen Crnković Vranko | 27,10 |
| 134. MilanSudec | 103,00 |
| 135. Melanija Grgić | 101,00 |
| 136. Stanko Rukelj | 12,00 |
| 137. Esperanto Societo Rijeka | |
| Omaĝe al forpaso de membro | |
| Miodrag Simiĉ | 41,00 eŭrojn |

Entute: 10.751,62 eŭrojn

RENKONTIĜO DE ESPERANTLINGVAJ VERKISTOJ

Esperantlingvaj verkistoj renkontiĝos en vilaĝo Hrašćina-Trgovišće de la 22-a ĝis la 24-a de julio 2006. Konfirmis sian alvenon pola tradukisto Tomasz Chmielik kiu preparis Esperantan eldonon de *Alia Venecio* de Predrag Matvejeviĉ. Li lanĉos la *Alian Venecion* en Florenco kaj survoje prezentos al ni verkon en Kroatio. Tomasz Chmielik kun sia eldonejo *Libro-Mondo* eldonis en la periodo 1991-2005 entute 114 librojn. Lia eldonejo estas la plej aktiva libroeldonejo en Esperantujo. Krome anoncis sian alvenon hungara lingvisto kaj verkisto Blazio Wacha.

OMAGE

Miodrag Simiĉ

Šimun Krešimir Janković



Franciskano. Naskiĝis en 1929 kaj forpasis la 17-an de decembro 2005 en Omiš. Pri Esperanto li ekokupiĝis, jam grave malsana, komence de 1990-an jaroj. Li verkis poemojn en Esperanto kaj celebris Esperantajn diservojn en Zagrebo.

Miodrag Simiĉ forpasis en Rijeka la 6-an de februaro 2006. Li naskiĝis la 15-an marto 1934 en Modriĉa, Bosnio kaj Hercegovino. Juran fakultaton li finis en Sarajevo. Ekde la jaro 1962 ĝis 1994 li laboris en ŝipfarejo "Treći maj" en Rijeka. Ekde alveno al Rijeka li aktivadis en Esperanto-Societo Rijeka precipe pri organizado de kulturaj kaj sportaj programoj. Li membris en loka organiza komitato de SAT-kongreso okazinta en Rijeka en 1980. En la jaro 1970 li estis unu el la fondintoj de Sporta Societo "Esperanto" Rijeka. Tiu societo aktivadis en Rijeka 12 jarojn, ĝis 1982, kiam la korbopilka teamo ŝanĝis la nomon al "Gornja Vežica". Ĝis sia forpaso li estis fidela membro de Esperanto Societo Rijeka..

V. Morankić

Kovrata de la Vento

Guniĉo-renko printempa

Pro la memoro de Dubravko Ivanĉan (1931-1982), pionira kroata hajkopoeto. "Mi kuŝas sur benko/ kovrata/ de la vento" de lia poemaro, *Papiliflugiloj* (1964).

neĝo degelas -
korvoj kaj rivermevoj
elserĉas koton /tomislav maretić [printempo]

papiliparo dancas
je ario silenta /norman darlington [printempo]

tiranta la kurtenojn
mi min adaptas
al la brilego /tm

per tri bieroj lokaj
li parolas fluege /nd

rustas ventflagoj
maldolĉa odoraĉo
el neniesland' /nd

aidos kaj sifiliso
libere kunpromenas /tm

Tomislav Maretić (1951) kuracisto, infektologo el Zagrebo. Laboras en Kliniko por infektaj malsanoj "D-ro Fran Mihaljević". Magistro pri scienco. Lia agadkampo estas aidoso kaj Lyme borreliosis. Okupiĝas pri hajka poezio. Haijkaron li publikigis en pluraj en- kaj eksterlandaj revuoj kaj antologioj.

Norman Darlington loĝas ĉe Bunclody, Irlando. Li estas verkinta hajkojn kaj alian japandevenan poezion kaj prozon ekde 2001, kaj lia verko eldoniĝas en multnombraj gazetoj kaj antologioj tutmonde. Li estas redaktoro de la interlingva revuo *Lishanu*. Montriĝas kelkaj ekzemploj de lia verko ĉe lia retejo Xaiku: www.Xaiku.com

somerfulmo...

ciaj kotaj piedoj

sur miaj femuroj /nd [somero, amo]

son' de harsekigilo

kiam li elŝteliĝas /tm [amo]

jen en glacio!

papavo iel frosta

plenflorante /nd [vintro, floro]

poemar de l' mortinto

kovrata de la vento /tm

frukrepuske la

luno en la koloroj

juglandfoliaj /tm [aŭtuno, luno]


libelo deleviĝas

de mia pajlĉapelo /nd [aŭtuno]

Tomislav Maretić (Kroatio)

Norman Darlington (Irlando)

Verkita de 28a aprilo ĝis 26a majo 2005
Tradukita de Norman Darlington



Ĉi tiu renko estis origine eldonita kroate kaj angle, en "Simply Haiku" V3N3:

http://www.poetrylives.com/SimplyHaiku/SHv3n3/renku/Covered_CR.htm

<http://www.poetrylives.com/SimplyHaiku/SHv3n3/renku/Covered.htm>

Kio estas renko?

Ĝi estas japandevena poemo kunverkita de almenaŭ du aŭtoroj. Historie, la pli konata hajko, kroate: haiku, devenas el la unua strofo de la renko, kaj ĉiu granda japana hajkomajstro, ekz. Baŝo, estis unuavice renkomajstro.

Renko verkiĝas laŭ la kerna principo de "ligi kaj formovi", per kiu ĉiu strofo ligiĝas iel kun la antaŭa, sed devas formoviĝi de la strofo antaŭ tiu. La rezulta poemo estas maltema, kaj spegulas anstataŭe la koncepton de poemo kiel mandalo, ekzegezo kosma, aŭ iu alia formo de esprimo metafizika de "unueco en diverseco".

62-a IJK



INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN SARAJEVO

Okaze de la 62-a Internacia Junulara Kongreso en Sarajevo okazonta de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 2006, *Tempo* publikigas unu el la plej famaj poemoj de Bosnio kaj Hercegovina *Emina* de Aleksa Šantić.

EMINA

Reveninte hejmen el varma hamamo,
Mi vidis ĝardenon de olda imamo:
Kaj tie en ombro de unu jasmeno
Belega Emina staris en ĝardeno.

Mi salutis inon, alvokis la Dion,
Ŝi silentis tie kaj diris nenion!
Ŝi akvumis florojn kun kalik en mano
Ne zorgante tute pri mia malsano.

De branĉetoj vento ekblovis surprize
Hartufetoj ŝiaj ekflirtis jebrize
Kaj en mia kapo turniĝis koŝmaro
Pro l' rava odoro de ŝia hararo.


Ŝi belegas tiel, ho kredo islama,
Ŝin fierus havi eĉ korteg sultana!
Se ŝi ekpromenas kaj ŝultrojn ekmovas
Eĉ preĝo imama ne plu helpi povas.

Mi preskaŭ stumblis, ho kredo patrina,
Sed ne venis al mi belega Emina.
Ŝi nur unufoje rigardis min ĝene
Sed perplekson mian ŝi neglektis plene!

Mortis la poeto, mortis eĉ Emina,
Jasmena ĝardeno dezertas ruina;
Rompiĝis kaliko, forvelkis la floroj,
Kanto pri Emina, restas en memoroj.

Aleksa Šantić

Esperantigis: *Nikola Rašić*



KONGRESOJ KAJ KONFERENCOJ VIZITINDAJ

21a – 23a de aprilo: Montkabano sur Kalnik (apud Križevci)

La 4a Familia Montkabana Renkontiĝo.
Kontaktadreso: vanja.radovanovic@ericsson.com
Retpaĝo: <http://www.angelfire.com/va2/Vanja>.



euroscola

23a - 30a de aprilo: Strasburgo, Francio

Kroataj lernejanoj ĉe Euroscola.

Kontaktadreso: Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava

11, 10000 ZAGREB, telefono: 01 461 7550, faksilo: 01 4619373, rete: esperanto@zg.htnet.hr



6a – 12a de majo: Ŝanhajo, Ĉinio

La 58a Konferenco de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio.

Kontaktadreso: IFEF-Kongreso,

Istvan Gulyas, Rakos u. HU-1155 Budapeŝt, kozsu13@freemail.hu, aŭ ĉe Kroata Fervojista Esperanto-Asocio, Mihanovićevo 12, HR-10000 Zagreb.

19a -21a de majo: Kostrena kaj Rijeka

Kroata konkurso pri scio de Esperanto por lernantoj el elementaj lernejoj.

Kontaktadreso: ĉe KEL (supre).

19a -21a de majo: Rijeka kaj Kostrena

Internacia junulara renkontiĝo pri temo: "Naciaj kulturoj kaj eŭropia identeco".

Kontaktadreso: Esperanto-Societo Rijeka, Blaža Polića 2, HR-51000 RIJEKA, telefono/faksilo: 051 228 148, esperanto.rijeka@ri.htnet.hr.

27an de majo: Hrašćina-Trgovišće

Meteorita festo.

Kontaktadreso: ĉe KEL.

22a - 24a de julio 2005: Hrašćina-Trgovišće, bieno de Spomenka Ŝtimec

La 3a Renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj.

Kontaktadreso: ĉe KEL.



29a de julio – 5a de aŭgusto: Firenze, Italio

La 91a Universala Kongreso de Esperanto. Kontaktadreso pri karavano: ĉe KEL.

72a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj.
Kontaktadreso: Antun Kovač telefono: 01 487 0142 kaj poŝtelefono: 098 993 5712



5a -13a de aŭgusto: Sarajevo, Bosnio kaj Hercegovino

La 62-a Internacia Junulara Kongreso. Informoj: hara@ikso.net.

Kontaktadreso: KEL.

6a – 12a de aŭgusto: Triesto, Italio

"Inter Karsto kaj Maro", internacia somera renkontiĝo en Triesto, Italio.

Kontaktadreso: noredv@tele2.it.

19a – 26a de aŭgusto: Beograd, Serbio kaj Montenegro

79-a SAT Kongreso. Informoj: V. Morankić

Kontaktadreso: esperanto.rijeka@ri.htnet.hr

21an – 24an de septembro: Dom pod Storzi, Slovenio

17a Montkabana Renkontiĝo. Kontakto: <http://www.angelfire.com/vanja/index.html>

19an de novembro: Kaštelir, bieno de Marcello Trampuh

Internacia esperantista renkontiĝo "Celebro de la nova vino".

Kontaktadreso: Marcello Trampuh, Krančiči 1, 52464 Kaštelir; marcello@trampuh.com

En la mondo en 2006 okazos pli ol 160 kongresoj, konferencoj kaj renkontiĝoj kie sola laborlingvo estas Esperanto. Plena kalendaro de Esperanto-aranĝoj en la 2006 videblas ĉe retpaĝo: <http://www.eventoj.hu>.

Kompilis: V. Morankić